


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



Panoramo de la Balatono kaj de Badacsony  
el la suda parto trafikanta trajno

4  
----- 61-a jarkolekto  
2017



## HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado  
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

\*

## MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

## ENHAVTABELO:

62. I. Gulyás: De kongreso al kongreso
63. J. Nagy: La 102-a Universala Kongreso
69. L. Gabalda: La 69-a IFEF-kongreso
70. L. Gabalda: La 50-a ILEI-kongreso
72. L. Gabalda: La 102 –a UK
73. L. Gabalda: La 90-a SAT-kongreso
75. J. Tomišek: El fervoja mondo
77. I. Gulyás: Fervojo ĉirkaŭ la Balatono

## DE KONGRESO AL KONGRESO

La plej gravaj eventoj en la vivo de Esperanto-movado estas la kongresoj. Ĉiujare okazas multaj kongresoj, inter ili kelkaj gravaj por la fervojistaj esperantistoj. Tiuj estas la diversaj landaj kongresoj, IFEF-kongresoj, Universalaj Kongresoj kaj la kongresoj de la aliaj fakaj asocioj ktp.

Al la nuna numero de nia faka revuo „Hungara Fervojista Mondo” mi ricevis raportojn pri diversaj gravaj kaj interesaj kongresoj de s-ino Liba Gabalda kaj s-ro János Nagy. Se mi legas tiujn raportojn, kaj rigardas la senditajn fotojn pri la eventoj de la kongresoj, mi sentas min en la kongreso, mi sentas la atmosferon kaj etoson de tiuj kongresoj. La legantoj povas percepti la diversajn stilojn, la aliajn vidmanierojn de diversaj eventoj, tamen ĉiuj raportoj donas al ni unuecajn opiniojn kaj travivaĵojn pri la tutaj kongresoj.

Kompreneble donas al ni gravajn konojn kaj informojn pri la diversaj fervojaj eventoj kaj novaĵoj el la „Fervoja mondo”. Tiujn sciigojn preparas jam longdaŭre nia ĉefkomitatano s-ro Jindrich Tomišek, kaj helpas al li revizii tiujn tekstojn s-ro Heinz Hoffmann. Mi ege dankas al ĉiuj esperantistoj, kiuj sendas preskaŭ regule kaj kontinue raportojn kaj sciigojn.

Estas interesa la artikolo pri la fervojo ĉirkaŭ la lago Balatono. Mi esperas, ke multaj legantoj bone povas uzi tiun konon, se vojaĝas ĉe la lago.

Estus bone, se mi ricevus de hungaraj fervojistaj esperantistoj por nia faka revuo pli da artikoloj, sciigoj, opinioj, ĉar nur per komuna fortostreĉo ni povas informi veran aktualan konon pri la fervojo eĉ pri Esperanto.

István Gulyás

61-a jaro N-ro 4, OKTOBRO – DECEMBRO

## LA 102-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Inter la 22-a kaj 29-a de julio 2017 okazis la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Korea Respubliko, en Seulo. En la kongreso partoprenis 1173 geesperantistoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj. Jam dufoje gastigis la koreaj esperantistoj en Seulo la esperantistaron. Nun la kongreso okazis en Hankuk Fremdlingva Universitato.

### Pri la lando



Korea Respubliko estas trovebla en la orienta parto de Azio, kiel oni konas en Sud—Koreio. Ĝi situas en la suda parto de la Korea duoninsulo. Ĝin limas norde Nord—Koreio, oriente la Japana maro (Orienta maro), sude estas trovebla la Korea markolo kaj okcidente la Flava maro. En la orienta kaj suda partoj ĉirkaŭas ĝin multaj etaj insuloj. Ĉirkaŭ trimil jarojn antaŭe altkulturaj popoloj migris en la korean duoninsulon, kaj intermiksiĝis kun la nacioj de la duoninsulo. Elformiĝis antikvaj regnoj iom antaŭ la Krista Erao. Tiuj regnoj okupis la tutan duoninsulon. La regnanto Shilla unuigis la duoninsulon en 676 p.K. Ĝin atingis eksteraj efikoj de Ĉinio kiel la budhismo, konfuciismo kaj aliaj ismoj. Poste sekvis multaj Dinastioj, kiuj establis ŝtatan religion, ideologion, kaj starigis politikan kaj ekonomian reformojn. La Dinastio Choson (1392-1910) estis la lasta Dinastio, ĉar en 1910 Koreio estis sub japana kolonia regado. Post 36 jaroj la japanoj perdis la mondmiliton, kaj Koreio estis dividita en demokrata Suda

Koreio kaj komunista Norda Koreio. En 1950 Norda Koreio invadis la Suda Koreion, kiu milito daŭris tri jarojn, kiam armistika konsento – kiu estis subskribita en 1953 – finigis la militon. Post la milito Korea Respubliko estis la plej malriĉa lando, sed ĝi ricevis internacian helpon kaj subtenon. La loĝantaro faris senlacajn klopodojn por rekonstrui la landon en direkto de prospero kaj stabileco, kaj per diligentaj laboroj

estiĝis plej evoluanta ekonomio, kaj tiel Sud-Koreio aliĝis al aziaj „Malgrandaj tigroj”.

La Korea Respubliko kun trimiljara historio kaj riĉa kulturo estas lando de fascina mikso de malnovo kaj novo. La plej karaj trajtoj de la korea popolo estas diligenteco, pacamo kaj bonkoreco.



*La granda pordego de Seulo*

Koreio situas en la mezvarma zono. Ĝia klimato estas milda. La ŝtatformo estas Korea prezidanta respubliko. La prezidanton oni elektas je kvin jaroj, kaj li estas ankaŭ la ĉefkomandanto de armeo. Koreio konsistas el ok sendependaj provincoj. La oficiala lingvo de Koreio estas korea, ĝi nomiĝas „hangulo”. „Hangul” signifas hungarlingve aboco. Ĉi tiu konsistas el dudek kvar literoj.

La publika sekureco de Koreio estas bona. La lando evoluas rapide. Tie estas troveblaj multaj vidindaĵoj, pro tio ankaŭ la turismo kaj fremdultrafiko rapide evoluas. Sud-Koreio estas la sesa plej vizitata lando en Azio.

La gastronomio de Sud-Koreio estas ege varia kaj sana, kaj estas videblaj ankaŭ la efikoj de japana kaj ĉina gastronomioj. Oni manĝas spicite. La plej konataj manĝaĵoj estas kimĉio, rizo, algo, fiŝo, kokino k.a.

Koreio estas fama pro la sportaj aktivecoj. Praktike preskaŭ en ĉiuj sportbranĉoj rolas elstare la koreanaj sportistoj. La lando aranĝis biciklajn konkursojn, futbalajn turnirojn, tablopilkon, aliajn diversajn pilkludojn, vintrajn sportojn ktp. La plej populara batala arto estas la „TaeKwan Do”, kiu devenas el Koreio, kaj ekde la jaro 2000 ĝi estas olimpika sportbranĉo. Tiun sporton fondis Ĉo Hong Hi soldata generalo, kiu estas naŭ „daneo”-majstro. Mi rimarkas, ke ankaŭ mi faris tiun sporton, kaj ĝi estas mia ŝatata sporto.

## **Pri Seulo**

Seulo situas en la nordorienta parto de Sud-Koreio. Seulo signifas: ĉefurbo. Seulo estis regne grava loko jam pli ol 1500 jarojn antaŭe. En 1394 ĝi estiĝis ĉefurbo de la Dinastio Choson, do en 1994 ĝi prifestis sian sescentan jubileon de la ĉefurbiĝo.



*János Nagy kun la prezidanto de KEA*

Tra la pasinta jarcento Seulo travivis surprizajn ŝanĝojn – la tumultojn ĉe la kleriga epoko, la torturajn jarojn sub la japana koloniregado, la korean militon kaj la tragedian dividon en du Koreiojn. Tamen Seulo eltenis tiujn eventojn, kaj jam estas internacia urbo kun pli ol 10 milionoj da loĝantoj, eĉ kune kun la antaŭurboj

(Incheon kaj Suwon) la nombro de la loĝantaro estas 15 milionoj. La popoldenseco estas tre alta. La urbon dupartigas la rivero Hangang sur kiu veturas multaj ŝipoj, kaj ĝi havas multajn pontojn. Viglaj stratoj, trankvilaj parkoj, homplenaj bazaroj, vendejoj,

restoracioj, amuzejoj, dekok metroo-linioj, malgrandaj dometoj kaj gigantaj ĉielskrapuloj troveblas en la urbo.

Seulon ĉirkaŭas montoj, kiujn mi povis ekkoni, ĉar mi faris solecajn ekskursojn en la montaro. La homoj estas tre ĝentilaj kaj helpemaj. Mi rimarkas, ke en 1988 en Seulo okazis la Someraj Olimpikaj Ludoj, kie la hungaraj sportistoj gajnis dekonu ormedalojn.

La kongreson oni organizis en la „Campus” de Hankuk-Universitato, kiu estis taŭga konstruaĵo por trankvile kaj bonrezulte labori, kunsidi eĉ amuziĝi. Tie funkciis la akceptejo, la libroservo, ekspozicioj, ejoj por prelegi kaj kunsidi k.a.

## Pri la kongreso

Antaŭ la kongreso, la 19-an de julio ni ekveturis per aviadilo de Budapeŝt ĝis Seulo. kaj ni alvenis en Seulon la 20-an de julio. La sep anoj de la hungara karavano estis: profesoro D-ro Gábor Márkus, honora prezidanto de HEA, S-ro János Nagy vicprezidanto de HEA, S-ino Enikő Zengő Sereghy

estrarano de HEA, S-ino Györgyi Koltai Asztalosné, S-ino Ildikó Pusztai, S-ino Ilona Köles, kaj S-ino Erzsébet Hellenpach Sóter. La gvidanto de la karavano S-ino Mária Eszes la prezidantino de la Hungaria Esperanto – Asocio bedaŭrinde ne povis partopreni pro ŝia malsaniĝo. Poste mi ricevis meŝaĝon, ke S-ino Erzsébet Székely kaj sia filo ankaŭ partoprenis.



*Hungaroj sin prezentas dum la Movada Foiro*

estrarano de HEA, S-ino Györgyi Koltai Asztalosné, S-ino Ildikó Pusztai, S-ino Ilona Köles, kaj S-ino Erzsébet Hellenpach Sóter. La gvidanto de la karavano S-ino Mária Eszes la prezidantino de la Hungaria Esperanto – Asocio bedaŭrinde ne povis partopreni pro ŝia malsaniĝo. Poste mi ricevis meŝaĝon, ke S-ino Erzsébet Székely kaj sia filo ankaŭ partoprenis.

Post la alveno al la kongresejo - konstruaĵo de Hankuk Universitato – la membroj de la hungara karavano transprenis la kongresan pakadon, aranĝis la loĝejon ktp. Min akceptis la Loka Kongresa Komitato kaj la prezidantaro de Korea Esperanto—Asocio (KEA): S-ino Oh Soon-Mo vicprezidantino kaj S-ro Kang Hongu (Kanguruo) vicprezidanto.



*La inaŭguro de la 102-a UK*

Min akceptis la Loka Kongresa Komitato kaj la prezidantaro de Korea Esperanto—Asocio (KEA): S-ino Oh Soon-Mo vicprezidantino kaj S-ro Kang Hongu (Kanguruo) vicprezidanto. Dum la kongreso min gastigis la unua vicprezidanto de KEA. Mi ricevis de ambaŭ vicprezidantoj la plej grandan helpon kaj subtenon, kiujn mi sincere dankegas.

Vendrede la 21-an mi interkona-

tiĝis kun la kongresejo, kun multaj kongresanoj. Mi helpis aranĝi la libroservon kaj la ekspoziciojn pri fotoj, kaj utiligi miajn konojn sur la tereno de la librovendado kaj aliaj organizaj laboroj.

Sabate la 22-an okazis Movada Foiro, kie kaj la hungaraj esperantistoj, kaj la IFEF-anoj aranĝis materialojn pri la hungara kaj la fervojista Esperanto-movado. Multaj interesiĝemaj esperantistoj vizitis ambaŭ tablojn.

Dimanĉe la 23-an antaŭtagmeze okazis la inaŭguro de la kongreso. Post multaj alparoloj, mesaĝ-laŭtlegadoj la prezidanto de UEA – D-ro Mark Fettes – faris malferman festan parolon. Li komence skizis la unikan rolon de niaj kongresoj, kiuj estas gardanto de nia komunuma vivo. Poste li akcentis: „*Ĉi-jare ni solenas la centan datrevenon de la morto de Zamenhof. Tra la mondo okazas ceremonioj, simpozioj, konferencoj dediĉitaj al lia vivoverko. Sed mi volas pledi por ankoraŭ pli vasta kompreno de ĝia signifo, kiel elemento en la daŭranta homara strebo vivi harmonie sur nia malgranda kaj unika planedo. Ŝajnas klare al mi, ke se Zamenhof vivus hodiaŭ, li senrezerve aliĝus al tiuj, kiuj alvokas por pli ekologi-komforma konduto de niaj nuntempaj socioj. Kiel ni ĉiuj povas atesti, nia industria civilizacio, inventaĵo de la lastaj jarcentoj, tendencas al troa, eĉ senbrida ekspluatado de la naturo, kondukante ĝusta kiel la plej malbona gasto imagebla, kiu ne nur malpurigas la domon, sed en la fino detruas ĝin. Tio estas precize la malo de la konduto, kiun rekomendas Zamenhof, ĉar se ni sekvas lian pensofluan, homarano ne povus esti alia ol bona samterano. Ambaŭkaze temas pri bona gastado kun identa etika sinteno: paŝi leĝere, ami la aliulon, celi al daŭripovaj rilatoj de reciprokeco. Se la aliulo povas esti ankaŭ besto, planto, rivero, dezerto, arbaro, aŭ kiu ajn alia parto de la naturo, tio ŝanĝas nenion esencan pri la dezirinda konduto.*” Tiuj pensoj estas validaj, kaj alprenas la aferon al nia koro. Mi konstatis, ke la tuta festparolo estis ege aktuala kaj enpensiga. Fine de la inaŭguro la reprezentantoj de la landaj asocioj kaj la aliĝintaj fakaj asocioj – inter ili nome de Hungario s-ro Gábor Márkus, kaj nome de IFEF S-ro Laurent Vignaud – salutis la kongreson.

Post la inaŭgura ceremonio kronis dimanĉon la nacia vespero kun simfonia orkestro, solkantistoj kaj danc-spektakloj. Kiel kutime la nacia vespero rikoltis grandan sukceson kaj longajn aplaŭdojn.

Lunde la 24-an okazis multaj prelegoj, inter aliaj la komputila aplikaĵo „Amikumu”. Okazis du studgrupoj de la Komitato de UEA, unu pri ideoj por nova kotiza strukturo, la alia pri la spezokontoj kaj buĝetoj de UEA. La Komitata Forumo pri Kunordigo traktis ankoraŭ la kongresan regularon.



János Nagy en la libroservo

Marde la 25-an – kiel ĉiam – estis la tago de Kapabligo, en tiu kadro oni fermis solene la „Jaron de la Lernanto”, kiun oni simile solene malfermis antaŭ unu jaro en la UK en Nitro. Okazis kunsido pri la Afrika agado, kio estas nova prioritato por UEA. La Komitata Forumo pri Konsciigo traktis la agadkampojn pri informado kaj eksteraj rilatoj. La Komitata Forumo pri Kapabligo traktis pri la regularo pri la KER-ekzamenoj, la buĝeton por Kapabligo 2018, la plua evoluigo de AMO.



*János Nagy prelegas*

Merkrede la 26-an estis la ekskursa tago. La kongresanoj povis elekti el multaj duon- kaj tuttagaj ekskursoj, kaj ĉiuj ĝuis la eblecon ekkoni la landon, regionojn, urbojn, kulturon, moron kaj la helpopretajn koreajn homojn. Mi ekskursis en la ĉirkaŭaj montoj de Seulo, eĉ al la malproksimaj montaroj, kie estas videblaj akvofaloj, fontoj,

danĝeraj rokoj kaj belegaj panoramoj.

Ĵaŭde la 27-an okazis futbalmatĉo, kiun la esperantista teamo superis lokan teamon per 1:0. Okazis surstrata manifestacio al kiu aliĝis kongresanoj, infanoj kaj junuloj el la Internacia Infana Kongreseto. La Komitata Forumo pri Komunumo traktis pri la kongresoj, la „Jaro de Esperanta Kulturo 2018”, la Kontinentaj Komisionoj kaj pri la Scienca kaj Faka Agado.

Vendrede la 28-an okazis la jam tradicia aŭkcio de diversaj movadaj eldonaĵoj kaj objektoj helpe de la aŭkciisto Humprey Tonkin. La fermo estis aparte bonetosa. Koncizaj raportoj estis prezentitaj fare de la estraranoj de UEA, kaj la prezidanto laŭtlegis la Kongresan Rezolucion. Sekvis anonco de la rezultoj de la Belartaj kaj Oratora Konkursoj, kaj la transdono de la Premio Deguchi de Oomoto. En la ferma parolo de la prezidanto de UEA taksis la rezultojn de la kongreso, kaj poste alvenis pli ol 60 partoprenintoj de la Internacia Infana Kongreseto, kies kantoj ricevis grandan aplaŭdon de la kongresanoj. Mi rimarkas, ke la kulturaj programoj, kiel la Nacia Vespero, Internacia Arta Vespero, Azia Vespero, Kajto koncerto, Japana Kulturo, Afrika movado ktp plaĉis al mi, kiuj kolorigis la tutan kongresan semajnon. La plej



*La meditada arupo en la postkonareso*

interesa travivaĵo estis la 5000-jara korea danco, kiun dancis, kantis kaj ludis nur virinoj. Ĝi fariĝis la kultura simbolo de Koreio. Fine la prezidanto dankis al la LKK, artistoj kaj helpantoj la senlaca laboron kaj la sukcesan kongreson, kaj sekvis la transdono de la kongresa flago al la reprezentantoj de la sekva Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Portugalio en 2018.

## Pri la postkongresaj tagoj



*La nova stacidomo de Seulo*

La hungara karavano partoprenis kvar postkongresajn tagojn en la kadro de la 13-a Internacia Esperanto Renkontiĝo de Meditado. Tio estis la plej granda kaj interesa travivaĵo por mi. Ni ekveturis per tri aŭtobusoj kune kun ĉirkaŭ cent partoprenantoj. La unua stacio estis urbo Iksan, kie ni vizitis nacian ĉefcentron de la budhismo. Ĝi havas belegan universitaton kaj kulturparkon. Ni vizitis la tian lagon, kaj tie oni faris fotojn pri la grupo. Okazis interesa kaj emocia interkona vespero. Tie ni

konatiĝis kun la religio Ŭonbulismo, kiu estas unu el la kvar grandaj religioj en Koreio kaj havas dekojn de temploj. En la dua tago ni rigardis korean nacian, tradician vilaĝon kaj poste ni veturis al urbo Jongsan.

En la tria tago frumatene ni faris ekskurson al la montaro. Tie ni vidis la leviĝantan sunon, kaj poste komencis la programon per meditado. Post tiu programo ni veturis al bordo de la Flava maro. Posttagmeze mi prelegis anstataŭ nia prezidantino S-ino Mária Eszes. La temo de la prelego estis: La kontakto de religio kaj arto. Dum la prelego mi prezentis filmon pri tiu temo. Helpe de la filmo oni povis ekkoni ankaŭ la arton de Mária Eszes. La filmo prezentis la vivon de Sankta Maria. La pentraĵoj de famaj pentristoj estas troveblaj en diversaj preĝejoj, bazilikoj kaj muzeoj de grandaj urboj de la mondo. Dum la filmo kantis la esperantista koruso Főnix el la hungara urbo Komló.



*Hungaroj dum la postkongreso*

En la lasta tago de meditata renkontiĝo ni povis aŭskulti intere-sane prelegon de D-ro Gábor Márkus. La temo estis socia krizo en Eŭropo pro popolmigrado. Post la bongusta tagmanĝo ni veturis al Seulo, kaj poste per aviadilo ni revenis al Budapeŝto.

**János Nagy**

*vicprezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio*

# La 69-a IFEF- KONGRESO

16 – 23 majo 2017

Ĝi okazis en tre bela kaj riĉa regiono de Alzaco en la pitoreska urbo *Colmar*. La eventon kunorganizis pluraj asocioj, inter kiuj membroj de "Espéranto-France Est" sub la gvido de André Grossmann kaj Edmond Ludwig. Partoprenis ĝin 147 esperantistoj el 21 landoj. Ĉi-foje la fervojista kongresa semajno komenciĝis marde per kunvenoj de la IFEF-estraro kaj LKK. Posttagmeze alvenadis gastoj, kiuj estis bonvenigataj en la stacidomo krom tiuj, kiuj alvenis per propra aŭtomobilo. Vespere ĉiuj konatiĝis en saloneto de la hotelo *Les Balladins*.

La solenan malfermon ĉeestis renomaj gastoj; nome de UAICF (Arta kaj Kulturfleganta



*Belega urboparto de Colmar*

Unuiĝo de Francaj Fervojistoj) prezidanto Ghislain Heinen, nome de BSW (fervoja sociala entrepreno) s-ino Barbara Sciesinski, nome de la urbo, la vicurbestrino de *Colmar* s-ino Cécile Striebig. Estis legataj salutoj de kelkaj E-organizoj inkluzive tiu de UEA. Okazis disdono de honoraj diplomoj pro elstaraj kaj sindonaj meritoj subtene al IFEF al elektitaj esperantistoj. Sekvis salutoj de la partoprenantoj de ĉiuj ĉeestantaj landoj, kiun gvidis la ĉefdelegito Jindřich Tomášek. La kongreson post la solena parolado kaj

kantado de la himno inaŭguris la prezidantino de IFEF Rodica Todor. Poste ni estis invitataj al aperitiva tostadado per alzaca vino akompanata per speciala regiona kuko, kiun prizorgis por ni la organizaĵo TAKE sub gvido de Michel Basso. Sekvis komuna fotado. En la loka ĵurnalo aperis artikolo pri la evento kaj krome ĝi estis anoncita sur municipa informtabulo. Posttagmeze eblis piede malkovri la belaĵojn de la urbo aŭ trapasi ĝin per verda turisma trajneto. Vespere ni ĝuis agrablan kulturan programon de la loka folkloro grupo *Vogesia* kun ebleco kundanci.

Dum la semajno okazis pluraj komitatkunsidoj, laborgrupoj, kaj kunsido de faka komisiono, estis traktataj movadaj aferoj, okazis ateliero pri informadiko, kurso por komencantoj. Bone ekipita estis la libroservo. Ĝi proponis librojn pri "Etaj rakontoj pri la katedralo de Strasburgo" inkluzive en Esperanto. Ankaŭ eblis aĉeti bildkartojn kaj specialan poŝtmarkon. En la kongresejo *Les Catherinettes* estis instalita ekspozicio pri Esperanto. Interesis prelego pri "Power Point pri FISAIC", kiun prezentis Lena Niemann. Pri trajnlinio inter Dreseno kaj Prago parolis Ladislav Kovář. Laurent Vignaud detale klarigis pri la dekstraflanka trafiko en Francio. La prelegon akompanis kelkaj bildoj. Same interesa estis prelego de Pierre Grollemund pri la tegmentoj de la stacidomo en *Colmar*. De Edmond Ludwig ni eksciis multajn interesaĵojn pri la regiono Alzaco, de Zlatko Hinšt pri la ĉefa stacidomo en Zagrebo. Pri aventuroj dum la trajna veturado en Barato estis prezentita filmo de gesinjoroj Gabalda. Ankaŭ Mireille Grosjean parolis pri siaj trajnaventuroj. Krome ŝi okaze de la Jaro de lernanto prezentis kelkajn skeĉojn teatrumante kun aliaj adeptoj. Samtempe okazis komitatkunsido de EFE (Espéranto France-Est). La partoprenantoj povis ĝui programon de IFEF. Venontan IFEF-kongreson, kiu okazos de la 21-a ĝis la 28-a de majo en Vroclavo (Pollando), prezentis per filmetoj la organizontoj. Ĉe la fino estis al ili transdonita la IFEF-standardo. Dum la vespera koncerto Maria

Grazia Barboni kantis por ni Esperante kaj krome ŝi prezentis kelkajn kanzonojn de Edith Piaf. Tre allogaj estis la duontagaj ekskursoj. Vastan ekspozicion de diversspecaj trajnoj, lokomotivoj, vagonoj kaj aliaj fervojaj artefaktoj ni povis admiri en la fervoja muzeo *Cité Mulhouse du Train*. Aliaj plaĉaj ekskursoj konatigis nin kun du urbetoj *Kaysersberg* kaj *Riquewihr*. En *Hunawihr* ni vizitis ĝardenon de vivantaj ekzotikaj papilioj. La tuttaga ekskurso kondukis nin al Strasburgo. Ĉirkaŭveturante per buso la parlamentejon, palacon de Eŭropo kaj aliajn gravajn konstruaĵojn, ni enboatiĝis por promeni sur la rivero ILL. Dumvoje ni rigardis belajn fasadojn de mezepokaj trabfakaj domoj. Post la boatado ni admiris la duan plej altan katedralon en Francio kaj aliajn stratojn de la urbo. Ravis la kvartalo *Petite France*.

Post la fermo de la kongreso okazis pluaj ekskursoj. Unue al la mezepoka burgo *Haut-Koenigsbourg*, kiu troviĝas ĉirkaŭ tridek kilometrojn norde de *Colmar*. Impona konstruaĵo kun multaj ĉambroj impresis nin. Vilaĝo *Ribeauvillé* estas konata pro vinkultivado. En *Hunawihr* troviĝas ankaŭ parko de la cikonioj kaj lutroj. Tie estas prizorgataj diversaj bestoj. Ni observis plurajn cikoniidojn dum la manĝado. Kelkaj estis freŝe naskiĝintaj (du-tagaj) kaj aliaj kelkmonataj. Ili havis nekredeblan apetiton. Dum la prezentado de lutroj ni spektis trejnitaĵojn kormoranojn, pingvenojn kaj aliajn bestojn. Ĝi estis tre interesa spektaklo alimaniere prezentita ol oni kutimas vidi en amuzparkoj. Tre pitoreska estas la urbeto *Eguisheim*, kiu famas pro tiea protektantino de Alzaco, *Sankta Odile* kaj pro la naskiĝo de la papo Leo la IX-a (1002-1054). Vera vivanta vilaĝo, al kiu estis translokitaj aŭtentikaj trabfakaj domoj estas la Ekomuzeo de *Ungersheim*. Amaso da cikonioj instaligis en tiu loko. La kongreso estis riĉenhava kaj bonetosa. Koran dankon al la organizantoj! La belega urbo *Colmar* ravis ĉiujn.

**Liba Gabalda**

## **LA 50-a ILEI-KONGRESO EN BUSAN**

**15-22. 07. 2017**

Meze de julio ILEI malfermis la serion de tri esperantaj kongresoj en Koreio. Post ĝi sekvis la 102-a UK en Seulo kaj tuj poste la 90-a SAT-kongreso en la apuda urbo Gimpo.

La kongreso de ILEI okazis de la 15-a ĝis la 22-a de julio en la dua plej granda urbo en Koreio, Busan, situanta en la suda parto de la lando. Fakte la kongreso estas la unua kun tiu-ĉi nomo. La decido estis prenita pasintjare en *Nyíregyháza*. Antaŭe temis pri ILEI-konferencoj.

La kongreson partoprenis 170 gesamideanoj el 21 landoj. La akcepto estis varma, same kiel la lando mem. Ni loĝis en komfortaj ĉambroj de la junulara gastejo *Arpina*.

Ĉiuj programeroj okazis en la oka etaĝo de la konstruaĵo. La temo de la ĉi-jara kongreso estis: "Edukado al Respektoplena Turismo". Ĝi estis ple-numita per kelkaj prelegoj kaj kompreneble per ekskursoj al



*Folkloro prezentado*

interesaj lokoj.

Sabate, dum la interkona vespero ni gustumis ĉefe aziajn kaj kelkajn alilandajn frandaĵojn. Koreaj esperantistoj dume prezentis belegan folkloran programon kun specifaj dancoj kaj muziko de sia kulturo. Krom variaj prezentadoj ni ĝuis grupo- kaj maskodancojn.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de la urbo Busan. La prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean, bonvenigis la kongresanojn. Estis legataj kelkaj bondezirmesaĝoj. Dum la paŭzo ni aŭskultis specialajn koreajn muzikilojn. Sekvis salutoj de reprezentantoj de ĉeestantaj landoj kaj la prezidantino konigis al ni la kongresan temon pri turismo. Post la malfermo de la kongreso ni komune fotiĝis.

Estis enkondukitaj novaj programeroj: "Pedagogia foiro" kaj "Literatura kafejo". Tiucele estis prezentitaj kelkaj libroj kaj paroladoj pri diversaj temoj. La Nacia vespero mirigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni ĝuis variajn prezentadojn de la korea folklorokulturo. Subtila estis *Dongrae* - la gruodanco, konata jam de la unua vespero.

La semajna programo inkluzivis Esperanto-kurson por komencantoj gvidatan de Annie Grente, progresantoj ĝuis viglan kaj amuzan kurson de Sylvain Lelarge kaj la instruistan trejnadon mastris Katalin Kováts. La fidelaj partoprenantoj ricevis atestilon. Ne mankis lernado de la korea lingvo eksprese sub gvido de Park Yongsung (Nema). Kun Mireille ni krozadis tra la lingvoj. Oni diskutis pri la maniero enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝis nun oni vane strebis pri tio. Tamen, ni estas esperantistoj, do ni devas esperi... En aliaj programeroj oni parolis pri gramatikaj tiklaĵoj pri Esperanto-centroj kaj pri privataj projektoj. Komitatanoj plenumis sian laboron dum pluraj kunsidoj kaj ankaŭ estis pritraktita la "Jaro de la Lernanto".

Sur la urba placo, antaŭ la teatro okazis lingva festivalo kun 16 lingvoj inkluzive Esperanton prezentitaj de la kongresanoj. Por la publiko, kiu bedaŭrinde ne abundis, estis aranĝita speciala kultura programo.

Ni spektis kvar filmetojn el filmokonkurso okaze de la Jaro de la Lernanto. Ni aljuĝis al unu el ili la premion de la publiko. Rilate al la temo pri turismo oni parolis pri la fama mondvojaĝanto kaj verkisto Tibor Sekelj. Marija Beloŝeviĉ parolis pri pozitivaj kaj negativaj efikoj de turismo. Aurora Bute vestita en bela rumana kostumo parolis pri kulturaj specifaĵoj de Rumanio. Sur prezentitaj bildoj ni povis admiri pentritajn preĝejojn ankaŭ de ekstere. La rumana bluzo inspiris plurajn famajn modistojn.

Kortuŝa estis la rakonto pri "Miljara Animo" (Koryo te-bovlo). Rob Moerbeek prezentis la korean literaturon. Interesa estis la ludo "Bafa-Bafa", en kiu temis pri konfronto de du malsamaj kulturoj.

Tre bongusta kaj enhavriĉa estis la kongresa bankedo en urba restoracio. Ĝi kontentigis ĉiujn ĉeestantojn per varia elekto de koreaj specialaj manĝaĵoj.

Al kongresanoj estis proponitaj pluraj duontagaj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon. Unu el la tuttagaj ekskursoj estis destinita al vizito de la urbocentro de Busan. Alia tuttaga ekskurso celis la regionon de Gyeongju, kie ni vizitis antikvajn tombojn. Unu el ili estis enrigardebla. Sekvis vizito de monaĥejo, kie ni tagmanĝis kaj plonĝis en meditado. Impresa estis vizito al templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.

Ĉe la fino de la kongreso estis prezentita la Iberia duoninsulo, kie okazos venontjare la 51-a ILEI-kongreso en la hispana ĉefurbo Madrido de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La portugala ĉefurbo Lisbono gastigos la 103-an UK-on tuj poste. Mireille Grosjean prezentis konkludan paroladon pri la kongreso kaj pri la Rezolucio. Sekvis dankoj kaj gratuloj al busanaj esperantistoj, kiuj sukcesis organizi belegan kongreson. Tiele plenumiĝis bondeziroj de urbaj reprezentantoj eldiritaj ĉe la inaŭguro. Ni ĝuis viglan kaj agrablan semajnon.

**Liba Gabalda**

## La 102-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 22-29. 07. 2017

La duan fojon la UK okazas en Suda Koreio en ties ĉefurbo Seulo. La prestiĝa evento disvolviĝis fine de julio en Hankuk Fremdlingva Universitato. Kolektiĝis 1174 geesperantistoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj allogataj de la azia kulturo. Novuloj spertis esperantistan etoson kaj ĝuis interesajn momentojn en amika rondo.

En la ĉirkaŭaĵo de la Universitato flirtis Esperanto-flagoj anoncantaj la eventon. Koreaj samideanoj produktis amason da belegaj afiŝoj kaj banderoloj por diversaj Esperanto-okazaĵoj. Dum la daŭro de la kongreso ili konstante kaj pasie laboris por nia bonfarto.

La inaŭgurtago bonvenigis nin pluve. Tamen tio ne malhelpis entuziasman renkonton kun malnovaj kaj novaj geamikoj. En la enirhalo la kongresanoj povis admiri kelkajn ekspoziciojn: fotoj el pasintaj kongresoj, pri L.L.Zamenhof, pri Esperanto kaj admirinde belaj estis ventumiloj. Eblis sin vesti kaj fotiĝi en reĝaj kostumoj.

La kongreso konsistis el la kutimaj programeroj de movada foiro, kleriga lundo, tago de lernado, merkredaj tuttagaj ekskursoj, junulara programo, komitata forumo, strategio kaj kunsidoj, traktado de la kongresa temo, kiu ĉi-foje estis: "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo".

Okazis IKU-AIS sesioj, lingvaj kursoj kaj KER ekzamenoj, kunvenoj de diversaj asocioj, SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado), LIBE (Ligo Internaciaj de Blindaj Esperantistoj), IKUE-KELI, (kristanaj organizoj) ISAE (sciencistoj) IKEF (komercistoj), IEJA (juristoj), TEĴA (ĵurnalistoj), IREK (komunistoj),



*Diversaj kostumoj de Koreio*

TADEN (nefumantoj) kaj aliaj. Kunvenis ankaŭ legantoj de Esperanto, Akademio de Esperanto, Afrika-, Oomoto- kaj Ŭonbulismo-movadoj. Okazis multaj aliaj interesaj programeroj, inter kiuj pluraj prelegoj pri Koreio, Aŭtoraj duonhoroj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, Aŭkciado. Ne mankis komuna fotado, urba akcepto, bankedo kaj kongresa balo, kiun animis la litova grupo Asorti. Ĉi-foje ne okazis strikta kontrolo ĉe enirpordoj al la diversaj okazaĵoj. Ankaŭ neniu

estis priŝtelita laŭ mia scio. La kongresanoj povis manĝi je

modestaj prezoj en studenta manĝejo. Enkondukiĝis nova programero Korea Kulturĉambro, kie ni povis gustumi korean teon, mem ornami ventumilojn per sekigitaj floretoj, lerni, danci kaj sekvi prezentojn de korea folklorokulturo. Ekster la programo okazis Internacia Pontkunveno en la Parlamentejo pri la Unuiĝo de la korea Duoninsulo, kiun ĉeestis 130 personoj el 21 landoj.

Estis elektitaj du Honoraj membroj de UEA kaj disdonataj diplomoj pro elstaraj agadoj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, premio Deguĉi, atestiloj pro 50- kaj 40-jaraj membriĝoj en UEA. Estis eldonita poŝtmarko kun portreto de L.L. Zamenhof kaj serio da belaj bildkartoj. Kongresa Kuriero "La Kandellumo verda" anoncis ĉiujn novaĵojn, ŝanĝojn en la programo, impresojn de partoprenantoj, en la listo aperis novaliĝintoj ktp. Kiel ĉiam, ampleksa estis la libroservo.

Gaja surstrata manifestacio kun tamburado sin direktis al loko, kie okazis la futbalmatĉo, en kiu unuafoje gajnis la esperantista teamo je granda ĝojo de ni ĉiuj.

Pluraj ĉiutagaj ekskursoj ebligis konatigi nin kun la naturo de Koreio, kiu konsistas el maro, montoj, riveroj, kampoj, vilaĝoj, urboj kaj urbegoj, palacoj, ĝardenoj, temploj kaj aliaj diversaj kulturaĵoj de jarmila historio.

Dum vesperaj kulturaj programeroj prezentis koncertojn Kajto, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, Eruda Li kaj Maju. La teatraĵon "El la vivo de insektoj", prezentis la ĉeĥa ensemblo DOMA. La trupo Espera Mondo prezentis koreajn tradiciajn artojn. Dum la Nacia vespero prezentiĝis la simfonia orkestro *Arirang* kaj ni povis spekti diversajn admirindajn programerojn. Ankaŭ la Internacia Arta kaj Azia vesperoj estis mirindaj.

En la fermo de la Universala Kongreso ni eksciis pri la venontaj kongresurboj. En la jaro 2019 la kongreso okazos en Lahti, Finnlando kaj en 2020 en Montrealo, Kanado. La venontjara UK disvolviĝos en Portugalio, en ĝia ĉefurbo Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Bonetosa estis la fermo de la kongreso al kiu kontribuis la nederlanda grupo Kajto. Laste prezentiĝis infanoj el la Infana Kongreseto, kiuj venis saluti nin en rekorde granda nombro.

Ĉiuj, kiuj povis partopreni la ĉi-jaran kongreson en Koreio devas senti sin feliĉaj. Koreaj sindonemaj kaj laboremaj samideanoj ne sensiluziigis nin pri la pasintjare promesita grandioza kongreso kun surprizoj. Ni plene ĝuis ilian gastamon en amikeca harmonio.

**Liba Gabalda**

## **LA 90-a SAT-KONGRESO**

**29.07 – 05.08. 2017**

Ĉi-jare la unuan fojon, la SAT-kongreso okazis en Azio. Post la impona 102-a UK en Seulo 105 kamaradoj el 16 landoj ĝuis la 90-an SAT-kongreson en apudseula urbo Gimpo, proksime de la bordo ĉe la Flava maro. Ĉefe la azianoj havis ŝancon konatiĝi kun alilandanoj, praktiki la lingvon kaj sperti la SAT-etoson. Junaj japanaj partoprenantoj tre aprezis personan kontakton kun esperantistoj el diversaj landoj.

Koreanoj bonvenigis nin per rideto, varma koro, frateco, amikeco kaj malfermitaj brakoj. Ni loĝis en komforta hotelo Yakam, kie okazis la antaŭviditaj programeroj. Krome, je dispono al la kongresanoj estis senpaga aliro al kuracaj banakvoj. Tion pluraj el ni profitis ĝissate.

Ĉe la alveno, post la registriĝo kaj ricevo de la kongresmaterialo ĉiuj partoprenoj povis elekti (laŭ sia grandeco) verdan T-ĉemizon kun surskribo: „SAT-tutmonda solidareco”.

La kongresa temo estis: „Demokratio en nuntempa mondo”. La semajna programo estis klare afiŝita sur apartaj paneloj kaj ankaŭ la kongreslibro en pli



*Kongresanoj antaŭ la grandega banderolo*

granda formato ol kutime (A4) enhavis ĉiujn necesajn informojn. Sabate dum la interkona vespero prezentiĝis du muzikbandoj de la „Paca agado sur strato”.

Dum la malfermo Vinko Markovo donis informojn pri SAT al la novuloj. Post la salutvortoj de PK kaj OKK sekvis salutoj de kelkaj organizoj: Rob Moerbeek salutis nome de UEA, Dieter Rooke nome de komunistoj, Franciska Tubale nome de Radio Melbourne kaj mi nome de fervojistoj. Malantaŭ la hotelo ni fotiĝis ĉe grandega banderolo kun E-slogano „Se ni kune sonĝas kaj praktikas, Alia Mondo Eblas!” Tuj poste sekvis prelego pri kandelluma revolucio, kiu sukcesis forigi la prezidentinon de Koreio. Posttagmeze en la sama tono daŭris parolado pri: „Multitudoj kaj absoluta demokratio”. Interesan sciencfikcian prognozon pri evoluo de Guglo kaj ĝia pasporto prezentis Hiongun Kim. Li kaptis intereson de la aŭskultantoj.

Vespere ni ĝuis belegan folkloran prezentadon de la ensemblo „Espera Mondo”. Sonis diversaj, al kelkaj el ni, nekonataj instrumentoj kaj tamburoj. Ĉe la fino ni povis kunkanti la faman kanton „Ariari”, muziki kaj danci kun la bele vestitaj aktoroj. Ĝojo kaj rido invadis ĉiujn ĉeestantojn. Ekde lundo komenciĝis kutimaj SAT-programeroj: estis prezentitaj agad- kaj jarraportoj. Okazis diversaj diskutoj, konferenco pri unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj, laborkunsidoj kaj kunvenoj de frakcioj – liberecana, vegetara, komunista, sennaciista, verdula, liberpensula.

Inter prelegoj elstaris tiu pri „Nuklea akcidento en Fukuŝima” prezentita de Hori Jasuo. Pri antropologio, kartografio kaj koloniismo prelegis Guilherme Fians el Brazilo. „Enrigardon al la korea literaturo” prezentis Rob Moerbeek. Pri „Koreaj lingvo kaj historio” prelegis HO Song. Pri „Esperanto kaj klasikaj lingvoj” donis informojn Saioa Escobar. „La rusan revolucion 1917” rememorigis Dieter Rooke. Pri „Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin” kaj belegajn bildojn prezentis Maria Butan el Rumanio. Pri sia domo en Kreto parolis Annie Grente. Pri siaj spertoj rilate veganismo parolis Paŭlino Gaborit. Pri „La memoro de E-movado” kaj pri Eduardo Vivancos, nuntempe 97-jaraĝa, parolis Xavi Alcalde, „Notoj pri monda kapitalismo” skizis Miyazawa Naoto el Japanio. Pri ĉina Tajpeo por Tajvano ni eksciis de Albengo. Pri „Faklaboro en Fejsbuko” informis Neil Blonstein. Tradukan laborgrupon gvidis Annie Grente. Hori Jasuo muzikis per diversaj malgrandaj muzikiloj akiritaj dum liaj multnombraj vojaĝoj. Ni eksciis pri la eldona fako kooperativa. De Alberto Calienes ni ricevis informojn pri Kubo kaj de Alfonse Waseka pri la Demokratia Respubliko Kongo.

Kulturaj vesperoj estis dediĉitaj al muzikprezentoj, kantoj kun gitaro kaj revoluciaj kantoj. Belan koncerton prezentis la litova ensemblo „Sepa kaj Asorti”. Kun scivolemo ni spektis teatran komedion „La malfermilo” prezentita de Saša Filipoviĉ kaj Franciska Toubale. Dum la distra vespero ni ĝuis korean operon. Japanan Te-ceremonion prezentis Huzimoto Hideko.

Interesaj ekskursoj gvidis nin al diversaj lokoj de la lando. Belega estis tiu al Buyeo, kie ni vizitis admirinde ravan lotusan ĝardenon kaj poste muzeon kaj templon. Alia ne malpli interesa montris la „Pacan observejon” en Ganghwa insulo, kie ni estis plej proksime al Norda Koreio, situanta trans la rivero Han. En la samloka muzeo multaj papermesaĝoj atestis pri deziro reunuiĝo. Plie ni vizitis fortikaĵon kaj la plej malnovan templon de Koreio.

La lastan tagon, dum la kvara laborkunsido, estis ellaboritaj kaj prezentitaj Gvidrezolucio kaj Deklaracio. Vespere okazis fermo de la kongreso kun donacoj kaj dankoj pro sindonema laboro fare de la organiza teamo. Ĉe la fino Saša Filipoviĉ prezentis la venontjaran urbon Kragujevac en Serbio, kie okazos la 91-a SAT-kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2018, la OKK trandonis al li la flagon.

La ĉijara kongreso estis riĉa el movada, kultura, distra kaj turisma vidpunktoj. Abundis interesaj prelegoj, konversacioj, belaj momentoj kaj homa interkompreniĝo.

**Liba Gabalda**

# El fervoja mondo

## Aŭstrio: **Jaro 2016 plinombrigis pasaĝerojn de ÖBB**

Jaro 2016 alportis plinombrigon de pasaĝeroj kaj ankaŭ pli multajn transportitajn vartunojn, tio estas unuaj rezultoj de la jaro 2016.

En la jaro 2016 plialtiĝis en longdistanca kaj regiona pasaĝertransportoj nombro da vojaĝantoj je ĉirkaŭ 4 milionoj, kiam en tiu ĉi jaro ÖBB transportis 238 milionojn da pasaĝeroj. Supra Aŭstrio kiel lasta federacia lando enkondukis en Decembro 2016 urbfervojan trafikon *S-Bahn*.

Por estonto la plej granda alvoko por ÖBB estas ciferecigo, kiu pligrandigos produktivecon de la fervojo. Bontenado de fervojlinioj tiel jam ne estos plenumata laŭ limtempoj, sed laŭ fakta stato de infrastrukturo. Ekzemple stato de radaksoj estos rekte anoncata de temperatursensiloj al bontenejoj. Ankaŭ en pasaĝertrafiko ciferecigo ĉiam pli partoprenos vendadon de transportrajtigiloj. Dua plej granda alvoko estas solvo de aĝo de la dungitoj, ĉar dum 6 venontaj jaroj pro aĝo forlasos ÖBB ĉiu kvara dungito, do ĉirkaŭ 10000 fervojistoj.

## Aŭstrio: **Konta Korto kritikis tarifojn de trafiko en dense setlitaj zonoj**

Konsiderinde mankojn en fervojtrafika tarifa sistemo por dense setlitaj zonoj, nome en ĉirkaŭaĵo de Vieno, Konta Korto (la plej alta kontrola organo en Aŭstrio), tiucele “elmetis malfavoran proklamon”, konstatis aŭstra tagĵurnalo *Der Standard* komence de Marto 2017. Tamen unuaj veturbiletoj devus esti enkondukitaj jam en la jaro 2008.

Ĝuste tiucele jam en la jaro 2002 okazis traktado inter Trafika Unuiĝo de Orienta Regiono (VOR) kaj Trafika Unuiĝo de Malsupra Aŭstrio kaj Burgenlando (VVNB), kiu celu pligrandigi harmoniigon de la tarifoj. „Kontrolo tamen trovis, ke ĝis nun ne okazis kunligo de diversaj tarifoj”, emfazis raporto de la Konta Korto, kiu riproĉis al fervojo malgraŭ kreskanta nombro de pasaĝeroj relative malaltan profiton ĉe bezono de senĉesaj ŝtataj monsubtenoj.

Situacio estas pro tio pli grava, ke anonco de bezono por publika trafiko en dense setlitaj zonoj, kiun uzas ĉefe regulaj laborcelaj pasaĝeroj, lernantoj kaj studentoj, senĉese kreskas, ĉar nur ekde jaro 2010 ĝis la jaro 2014 nombro da pasaĝeroj kreskis je 41 procentoj, anoncis la tagĵurnalo.

## Germanio: **Germanaj Fervojoj denove atingis rezultojn kun nigraj numeroj**

Post “malprofita” jaro 2015 Germana Fervojo *Deutsche Bahn (DB)* en la jaro 2016 denove atingis “nigrajn numerojn”. Profito de ekspluata servo antaŭ impostigo (*Ebit*) atingis 1,8 miliardojn da eŭroj. Rezultoj de la konzerno fariĝis konataj fine de marto 2017. En la jaro 2015 operacia malprofito estis 154 milionoj da eŭroj, kiam temis plejparte pri amortizoj de vartrafiko. Nova serva programo kaj programo de kvalito “*Zukunft Bahn*” (Estonto de fervojo) bone ekmaŝtriĝis, kiam pliboniĝis plenumo de horaroj en longdistanca trafiko de 74,4% (2015) al 78,9% (2016), kvankam la celon 80% oni ne sukcesis plenumi. Plenumo en regiona trafiko estis 94,8% (jaro 2015: 94,2%), kaj en vartrafiko 76,0% (jaro 2015: 72,8%).

Pro kunordigo de projektoj por ciferecigo estas fondita nova posteno “*Chief Digital Officer*”, kiu estas por ciferecigo ĉe DB responsa.

Italio: **Trafikisto *Trenitalia* deziras apartigi grandrapidan trafikon**

Italaj Ŝtataj Fervojoj (*FS*) deziras en unua duonjaro 2017 apartigi grandrapidan trafikon al memstara kompanio, kiu povus nomiĝi "*Le frecce*". La kompanio povus fine de la jaro 2017 iri al borso. Proklamis tion ĉefo de *FS*, sinjoro *Renato Mazzoncini* ĉe malfermo de nova fervoja liniosekcio de linio por grandrapido *Treviglio – Brescia*, kiu troviĝas sur akso Milano – Venecio. La nova sekcio de fervojlinio por grandrapido estas en ekspluatado ekde



11.12.2016, estas tute kvartraka, ekipita per trajnsekurigsistemo *ETCS* apliknivele 2 kaj estas por rapido maksimuma 300 km/h. La nova linioparto al *Rovato* estas 39,6 km longa. Pliaj 19 km al *Brescia* iras paralele kun ekzistanta fervojlinio al *Brescia*.

La vojaĝtempo estos reduktata de 46 minutoj al finaj 30 minutoj.

Germanio: **Multaj kompanioj en trafika merkato**

En germana trafika merkato nuntempe aktivas ĉirkaŭ 400 kompanioj. Neniuj oficialaj aŭ kvalitataj resumoj kaj statistikoj de la konkurantoj de Germana Federacia Fervojo *DB* ekzistas. La situacio estas pli komplikata de tio, ke iuj firmaoj aspektas kiel sendependaj, kvankam ili estas propraĵe kun *DB* kunligitaj. Fakto publikigata de *DB* mem estas nur tio, ke partopreno de la konkurantoj de vartrafika filio *DB Cargo* sur germana fervoja varmerkato estas 39,1 % alta. Kiel pluajn elstarajn konkurantojn en vartrafiko eblas taksi filiajn kompaniojn de ceteraj eŭropaj trafikistoj *SNCF Geodis (Captrain, ITL)*, *SBB Cargo (SBB Cargo Deutschland)*, *FS Treitalia (TX Logistik, OHE)*, *CFL Cargo (CFL Cargo Deutschland)* aŭ nove *PKP Cargo*. Ni tamen ne forgesu kompaniojn *Rheincargo* kaj *HSL Logistik*.

Filio *DB Netz* estis fondita en la jaro 1999. Interese estas, ke ekzemple najbara Ĉeĥa respubliko iris sur vojo de plena divido de gvidanto de infrastrukturo (*SŽDC*) kaj de la trafikistoj, Germanio iris sur vojo de holdinga aranĝo. En ambaŭ kazoj tamen estis plenumita direktivo de Konsilio *91/410/EHS*, kies celo estas :divido de administrado de fervoja trafika infrastrukturo ek de priservado de fervoja trafiko kun deviga divido de kontoj, kaj de elektebla divido organiza aŭ institucia.

Eblas aldoni, ke ekzemple interesojn de ĉeĥa filio *ČD Cargo* en Germanio protektas filia kompanio *ČD Generalvertretung GmbH* kun sidejo en Frankfurto ĉe Majno. Tiu ĉi estis fondita jam en la jaro 2005 kaj estas tiel la plej aĝa "filino" de *ČD Cargo*.

Fotoj: 1. En vara kaj pasaĝera trafikoj en Germanio aktivas granda nombro da ne-federaciopropraj trafikistoj.

2. Tra landlima transiro *Kaldenkirchen DB – Venlo NS* trafikis multaj kontenertrajnoj.

Laŭ diversaj fontoj preparis: **Jindřich Tomíšek**  
reviziis: **Heinz Hoffmann**



malfermis en 1864. Post la unua mondmilito la teritoriojn de la landoj ŝanĝis, kio grave influis la funkciadon de la „Suda Fervojo”, sed por la sudbalatona fervojo tiu ŝanĝo okazigis preskaŭ neniun efikon.

Laŭ la pretendo de la trafiko oni daŭre malfermis novajn fervojstaciojn kaj haltejojn, kaj oni plivastigis la konstruaĵojn de la stacioj, eĉ plilongigis la fervojretojn en la stacioj. La elektrizado de la fervojlinio ĝis la stacidomo Keszthely okazis inter la jaroj 1988-1990. Per tiu elektrizado kaj la riparo de la trakoj kaj la sekurigaj instalaĵoj certigis pli grandan



*Fervojo apud la Balatono*

rapidecon, kaj per la ĝustigo de la horaro al la pretendo de la vojaĝantoj, la fervojo kunportis pli proksime la ĉefurbon Budapest al la Balatono. Ankaŭ nun progresas la rekonstruaj laboroj ĝis la fino de ĉi tiu jaro. En tiu kadro oni konstruas novajn altajn kajojn, novajn stacidomojn por pasaĝeroj, elastajn vibroamortizajn balastojn kaj kontraŭbruajn murojn. Tiel malpliigas la bruonivelo, pliboniĝas la vivkvalito de tie vivantaj homoj. La rezultoj de

la konstruaj laboroj plue mallongiĝas la vojaĝdaŭron, kiu estas inter Budapest kaj Keszthely 2,5 horoj. Poste en kelkaj fervojstacioj estos atendeblaj ceteraj evoluigoj, kiuj ĉefe akcelos kaj helpas la komforton kaj sendanĝerecon de la vojaĝantoj.

La fervojlinio sur la norda parto de la lago Balatono konsistas el du etapoj. La unua parto havas 107 km-ojn longecojn inter Szabadbattyán kaj Tapolca. Tiu fervojlinio estas unutraĉa kaj neelektrizada, sed ĝi donis al la norda parto de la lago ekprosperon tuj post la finkonstruo. La permesita rapido estas 80 km/h. La vartransportado estas malgranda, kaj prefere por la pasaĝertrafiko konstruiĝis tiu (Balatonkenese, Balatonfűzfő, Balatonalmádi, Alsóörs, Balatonfüred, Aszófő, Balatonakali-Dörgicse, Zánka-Köveskál, Révfülöp, Badacsonytomaj, Badacsonytördemic-Szigliget kaj Tapolca), kaj 20 fervojaj haltejoj. Ankaŭ sur tiu fervojlinio troveblas dense stacioj kaj haltejoj.

El la stacio Tapolca disforkiĝas duaranga fervojlinio al Celldömölk kaj Szombathely. La konstruo de tiu fervojlinio okazis en pluraj etapoj inter la fino de la 1800-aj jaroj kaj la komenco de la 1900-aj jaroj. Post la efektivigo de la etapoj oni ekfunkciigis ilin, sed la trafiko sur la tuta linio komenciĝis la 1-an de julio 1909. Ekde tiam la



*La stacidomo de Siófok*

fervojlinion oni plurfoje renovigis, ĉefe post la detruo de la dua mondmilito. En la kadro de la renoviga laboro la linio havis modernigon, traksekciajn bloksistemojn, trakonstruojn de la stacidomoj por pasaĝeroj. Mi rimarkas, ke en la nuna jaro por la „Naĝanta Mondĉampionado” la stacidomon de Balatonfüred oni modernigis. Unu el la plej interesa kaj vidinda rekonstruo estis en la 1950-aj jaroj, kiam inter la du stacioj Balatonkenese kaj Balatonfűzfő la linion oni transmetis al la Balatono, ĉar la leŭsmuro traglitis al la fervojlinio kaj tion ŝovis

en la Balatonon. Pro tio la linion oni rekonstruigis en la lago, kaj ankoraŭ funkcias la fervojo sur tiu traceo.



*Trajno en la haltejo Balatonarács*

Inter la ceteraj evoluigoj la Hungaraj Ŝtatformoj (MÁV) planas la elektrizadon de la fervojlinio en du partoj, nome inter Szabadsbattyán kaj Aszófő ĝis 2019, kaj poste kontinue inter Aszófő kaj Tapolca, eĉ inter Tapolca kaj Keszthely. Samtempe kun tiu elektrizado okazos la pli nova rekonstruo de la fervojreto.

Jam estas malnova deziro eĉ plano – ĉefe flanke de la vojaĝantoj kaj somerumantoj – por ĉirkaŭvojaĝi per trajno la Balatonon sen trajnŝanĝo. La Hungaraj Ŝtatformoj ekzamenis la

eblecojn, kaj konstatis, ke al la Tapolca ekzistantan fervojlinion devus mallongigi kaj konstrui pli proksime al la Balatono per rekta kunligo de la stacioj Balatontördemic-Szigliget kaj Balatonedercs. Tio estas bona ideo, sed okazigas problemojn, ke inter la du stacidomoj la areo estas marĉa, kio grave pligrandigus la konstrukostojn, eĉ la areo nuntempe estas sub la naturprotektado, ĉar tio apartenas al la „Balaton-felvidéki” Nacia Parko.

La alia mallongiga ebleco estas la rekonstruo de la ekzistanta sed malbonstata lineosekcio inter Csajág kaj Lepsény. Oni ankaŭ ekzamenis la eblecon konstrui novan fervojlinion rekte apud la Balatono inter la stacioj Balatonakarattyá kaj Balatonaliga. La realigoj de tiuj imagoj efektiviĝus la revoj de la loĝantoj kaj somerumantoj ĉe la Balatono, tio plue kreskigus la altiron de la lago en la tuta Eŭropo.

La dua etapo de la norda parto fervojo havas 25 km-ojn inter Keszthely kaj Balatonszentgyörgy. Sur tiu fervojlinio troveblas tri fervojstacioj (Balatonedercs, Vonyarcvashegy kaj Keszthely), kaj entute nur 6 fervojaj haltejoj.

La rekonstrua laboro jam preskaŭ finiĝis inter Balatonszentgyörgy kaj Keszthely, kaj en la alia parto de la linio inter Keszthely kaj Tapolca la rekonstrua laboro kaj elektrizado okazos kune kun la plena fervojlinio inter Szabadsbattyán kaj Tapolca.

Fine mi proponas nuntempe ĝoji pro la rekonstruaj laboroj, pro la planitaj evoluigoj, pro la elektrizado de la norda parta fervojlinio de la Balatono, kaj pacience atendi la efektivigon de la ĉirkaŭvojaĝa ebleco de la lago Balatono.



*Trajno rekte apud la lago Balatono*

**István Gulyás**



**Hungaroj dum la 102-a Universala Kongreso  
de Esperanto**



**La 70-a kongreso de IFEF okazos de la 19-a  
ĝis la 25-a de majo 2018 en la pola urbo Vroclavo  
Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de la  
Hungara Fervoja Esperanto-Asocio**